LSG FORUMO n–ro 140 (3 / 2008)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

# UK 2008: interesaj LSG – aktivecoj



## Enhavo:

Protokolo de la kunveno en Roterdamo 3
Akcepto de la LSG-anoj ĉe COC-Rotterdam 3
LSG-ekskurso al Amsterdamo 4
Intervjuo al Francisko Domínguez en Novjorko 5
Mortis Jörg Heider 9
Historio de LSG 9
Geja Parado en Madrido (Hispanio) 10
Geja memoraĵo difektita en Berlino 12

L. S. G.

**Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj**

interretejo: http://lsg-esperanto.org
adreso: la sekretario (vidu sube)
membriĝo: ĉe la sekretario
kotizoj: 10 EUR por 1 jaro
25 EUR por 3 jaroj

**Estraro**

Prezidanto:

Francis: fsoghomonian (at) yahoo.fr

Sekretario:

Rolf: lasekretario (at) gmx.net

Kasisto:

Rolf: lakasisto (at) gmx.de

Estraranoj:

Arnold: arvimide (at) earthlink.net

Paul Harry: Phsb (at) orange.net

Retejo:

Randy: randy.dean (at) pobox.com

## FORUMO 140

**Membrogazeto de la LSG (3/ 2008)**

adreso: la sekretario (vidu supre)
redakcio: laredaktanto (at) gmx.net
Maŭro, Italio
Juanjo, Hispanio

interreta versio: La gazeto aperas ankaŭ interrete kiel PDF-dosiero (vidu interretejo) Por via integro, ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigataj en la interreta versio.

ekspedo la sekretario (vidu supre)

! *Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono **ne** estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

**Limdato por FORUMO 141:** 2008-12-14

## Nova redakci-teamo

Karaj legantoj,
post la adiaŭo de Bernvardo, ĝis post la jarasembleo (kiel vi konstatos legante la protokolon), ne troviĝis nova redaktanto por nia bulteno. Ĉiuj timis alpreni la laboron! Do, post kelksemajna pripensado, ni nin reciproke kuraĝigis, kaj nun, por ke LSG plu povas liveri al ĉiuj liganoj nian nemalhaveblan revueton, jen al vi DU redaktantoj: Maŭro kaj Juanjo *[Ĥuanĥo]*.
Maŭro estas jam longtempa membro, Juanjo estas membro de la asocio kaj nun decidis kunlabori por kune redakti, kun granda plezuro. Sed ĝi estas la bulteno de ĉiuj LSG-anoj.
Pro nia "novuleco", tiu ĉi bulteno certe ne aspektas tiom bele, stile kaj grafike, kiel la pasintaj. Ni celas plibonigon por la venontaj.
Kaj ni jam dankas la kutimajn kunlaborantojn: Rolf, la estraranojn, kaj ĉiujn, kiuj sendis kontribuojn por informi pri la gej-lesba vivo, instigi al pripensado, ravi (kaj revigi) per poemoj kaj rakontoj.
Al ni la komposta laboro, al ĉiuj la ĝojo ricevi la bultenon kaj la ĝuo legi ĝin. Almenaŭ ni tion esperas.

*Maŭro kaj Juanjo*

**Kontribuoj por FORUMO kiel informoj, bildoj kaj artikoloj estas ĉiam bonvenaj**

*Vi bonvolu kompreni …*
*… ke nur libere uzeblaj kontribuoj povas esti akceptataj*
*… ke estas neniu garantio, ke alsenditaj kontribuoj estos publikigitaj*
*… kaj ke materialo nur en esceptaj kazoj povas esti resendita al vi.*

*Ni konservas al ni la rajton redakcie ŝanĝi kontribuojn.*

*Nesubskribitaj artikoloj estas de la redakcio.*

# Protokolo de la kunveno en Roterdamo

1. Randy akceptis esti protokolisto.
2. Ne estis ŝanĝoj al la tagordo.
3. Arnold akceptis esti raportisto de la kunveno.
4. La protokolo de la antaŭa ĝenerala kunveno estis aprobita.
5. La raporto de la kasisto ankoraŭ ne alvenis, sed la financoj estas en bona stato.
6. Estis amerika prezento pri LSG ĉe la komuna usona/kanada kongreso.
7. Maŭro komentis, ke ni devus uzi nian tempon en la kongresejo parolante al la ne-membroj pri niaj agadoj.
8. La jarkotizo restos same.
9. Francis estis elektita kiel prezidanto (li aldonis kondiĉon ke tio estu por unu jaro). Rolf estis reelektita kiel kasisto/sekretario. Randy estis reelektita kiel retprizorganto. Arnold kaj Harry estis elektitaj kiel estraranoj.
10. Ne estis decido pri la redaktado de la bulteno.
11. Estis unuanime aprobita rezolucio sendi bondezirojn al la sekretario post operacio. Estis unuanime aprobita rezolucio sendi kondolencojn al Fritz FERDINAND pro la forpaso de lia patro.
12. Estis anoncoj: la LSG budo estos ĵaŭdo, estos vizito la COC (la landa geja/lesba organizo) lundo, kaj estos tagekskurso la Amsterdamo kaj Haarlem merkredo.
13. La venonta ĝenerala kunveno estos ĉe la 2009 UK en Białystok.
14. Starado por forpasintaj LSG-anoj.
15. La kunveno estis fermita.

# Akcepto de la LSG-anoj ĉe COC-Rotterdam

Kiel jam okazis plurfoje dum la Kongresa Balo (lunde), por ni lsg-anoj estis organizita vizito de la loka GLAT-asocio, en Roterdamo la centro “COC”.

Tie ni estis akceptataj de du estraraj membroj, kiuj rakontis al ni la historion de la GLAT-movado en Nederlando kaj la fondiĝo de la COC – centroj post la dua mondmilito, kaj poste prelegis al ni, kun helpo de lum-bildoj, pri la historio de la rajtoj por samseksemaj kaj transseksaj homoj en Nederlando kaj pri la progreso kaj nuna situacio tra la tuta mondo.

Ĉion diratan tradukis nia kara membro Bert.

Post tiu prezentado, ili nin regalis per teo kaj biero, kaj ni povis plu babili libere en la kafejo de la centro.

COC estas la mallongigo de “Cultureel Ontspannings Centrum”, t.e. “Kultura Distriĝa Centro”, nomo eltrovita de la fondintoj, en 1946 en Amsterdamo, kiam la vorto “samseksema” ne estis akceptita. La postan jaron, 1947, estis

fondita la centro en Roterdamo; tial, en 2007, ili festis sian 60-jaran datrevenon, kun la subteno de la urba estraro. La celoj de la asocio, sinteze dirite, estas:

- instigi la sociajn reformojn por plivastigi la integriĝon kaj akcepton de samseksemo;
- instigi la unuopulan emancipiĝon per konsciigo pri la individuajn kaj sociajn situaciojn koncerne samseksemon, ambaŭseksemon kaj la genrajn rolojn.

*Informoj kaj foto kolektitaj el la retejo*




*http://www.cocrotterdam.nl*

# LSG-ekskurso al Amsterdamo

La 23an de julio 16 gejoj partoprenis ekskurson al Amsterdamo. Tiu ĉi ekskurso estis produkto de lastmomenta organizado far Bert en konsento kun Rolf, la sekretario de LSG.

Oni foriras matene el Roterdamo per trajno al Amsterdamo kaj per tramo al Westermarkt, kie apudas Anne Frank-muzeo. Sed la celo de la ekskurso estas ja tiu rozgranita monumento, kiu konsistas el tri trianguloj: la t.n. "homo-monument".

Kompreneble oni ŝatas foton sur la monumento apud kanalakvo. Feliĉe ĉeestas viro kiu pretas diversfoje foti per la kameraoj de ekskursantoj.

La monumento estas iniciato de geja amsterdama konsilantarano Bob van Schijndel en la sepdekaj jaroj kaj post sufiĉe da tempo ĝi estas realigita.

Apude oni povas rigardi en la speciala kiosko kiu informas pri la geja-lesba vivo en Amsterdamo (t.n. "Pink Point").

Sekva celo de la ekskurso estas la gej-lesba kvartalo ĉe Reguliersdwarsstraat kaj Rembrandtplaco, sed unue oni rigardas iom en la speciala butiko por libroj, DVD-oj k.s. de Vrolijk, apud la reĝa palaco, kaj lunĉas en Spuistraat, vid'al vide de la fama okupita domo De Vrankrijker. Feliĉe la vetero estas sufiĉe agrabla kaj ankoraŭ pli la akompanantaro kiu faras ŝercojn, koketas kaj ĝuas la etoson de la urbo.

Kompreneble la plejparto de la gejaj kaj lesbaj kafejoj en tiu horo de la tago ne estas vere multvizitata se jam malfermitaj, sed tio ne tro gravas. Oni havas impreson pri la lokoj kie oni povus en la noktaj horoj renkontiĝi kun samseksemuloj.

La statua grupo sur Rembrandtplaco memorigas pri la pentraĵo "La Noktgardistoj" kaj instigas al multaj fotoj. Kiu ja ne volas estas eternigita kiel

noktogardisto porokaza?

Kafejo por la klasikemaj gejoj estas "l'Opera" kaj tie en la suno oni povas spekti la preterpasantojn aŭ pli detale esplori la tipajn trajtojn de la najbaro. Efektive, la operejo estas tute apude, trans la ponto, sed ni ne vizitos ĝin, nur preterpasas kaj iras al la kanala ruĝa kavrtalo kie oni povas rigardi la montrofenestrojn de prostituinoj (prostituitoj ja estas en alia parto de la urbo, sed kompare malmultaj…).

La komunumo de Amsterdamo lastatempe provas sanigi la kvartalon, forigante krimecajn ekspluatantojn de bordeloj, k.s. Apude estas Warmoesstraat, kie oni povas trovi ankaŭ gejajn kafejojn kaj renkontejojn, jes aŭ ne mallumajn.

La senstreĉa etoso de la ekskurso kaŭzis ke oni preskaŭ forgesas la tempon. Harlemo vokas la grupon kaj per la trajno oni reiras Roterdamon per Harlemo. Tipa holanda urbo kun historio de pli ol 770 jaroj, Harlemo havas diversajn interesajn kortojn, muzeojn, preĝejojn kaj muelilon rekonstruitan.

Du el la kortetoj el la 18a jarcento oni vizitas kaj rigardas la muelilon "De Adriaan", la grandan placon kun Viandohalo (nun parto de Frans Halsmuzeo), la urbodomo kaj la granda preĝejo kie okazas en tiu tempo orgenkonkurso sur la fama Müller-orgeno.

Atendas la restoracio "Esperanto" en Lange Veerstraat. Antaŭ ne tro longa tempo malfermita restoracio kaj iniciato de s.ro Wereldsma (Mondeca), kiu uzis la nomon Esperanto por indiki ke li en sia restoracio kuiras pladojn el la tuta mondo kaj ne hezitas kombini ilin.

Kvankam ne-esperantisto, la sinjoro povas bone komprenigi sin al ni per niaj du nederlandaj partoprenantoj. La tripladan menuon oni poste laŭdis kiel "plej bonan manĝon kiun mi en NL manĝis ĝis nun…".

Kun bela memoro pri tiu senstreĉa kaj somereca tago en Amsterdamo kaj Harlemo, salutas vin,

Bert de Wit

# Intervjuo al Francisko Domínguez en Novjorko

*Francisko Domínguez estas Esperantisto. Dum la 70-jardeko, li estis geja aktivisto. Okaze de la 30-jara datreveno de geja partopreno en la novjorka portorika defilo, li estis intervjuata de Claudia Torrens, ĵurnalistino de Katalunio, por la hispanlingva novjorka ĵurnalo El Diario-La Prensa. Jen la intervjuo elhispanigita.*

## GLAT-KOMUNUMO EN LA PORTORIKA PARADO: 30 JARON DE HISTORIO

Claudia Torrens, 2008-06-08, El Diario Novjorko:

Novjorko — Francisko Domínguez neeviteble ridetas memorante la unuan fojon kiam kontingento de gejoj kaj lesboj borikenaj[1] partoprenis en la la Portorika

1 *Borikena: Esperantigata el laŭlanda nomo "Borikén", originala nomo de insulo Portoriko*

Defilo Nacia. Estis la jaro 1978, la nervozeco kaj deziro partopreni estis forta, komentas tiu ĉi 54-jara portorikano kiu troviĝas inter la unuaj gejoj kiuj marŝis en la festivalo.

Tridek jarojn poste, precize je tiu ĉi 8-a de junio, ne plu estas gejaj, lesbaj nek transseksemulaj asocioj kiuj partoprenas la okazaĵon. Tamen, oni ankoraŭ rigardas ĝin kiel la plej alireblan kaj apertan, turniĝintan en unu de la unuaj, kiuj en la 70-jardeko malfermis la pordon al homoj de malsama seksa orientiĝo.

Ekzemple, la irlanda parado ankoraŭ ne permesas partoprenon de samseks–emuloj. Ni neniam spertis tion [en la portorika parado], klarigas al ni Domínguez. La unua kontingento samseksemula defilis sekve de invito fare de la Portorika Socialista Partio, komentis la borikenano.

Ĵus tiam naskiĝis la Latin-amerika Komitato Samseksemula; proksimume ok el ĝiaj anoj partoprenis. "Kelkaj partianoj ne estis tre kontentaj. Sed ene de la Partio ekzistis emo por alproksimiĝi al gejoj," komentis Domínguez, kiu estis unu el la fondintaj membroj de la komitato. Ekdefilante, inter la spektantoj troviĝis multaj huŝkriantoj, sed ankaŭ laŭdantoj kaj subtenantaj kriantoj. Komitatanoj ridetante marŝis inter hom-amaso portante afiŝon kun frazo "Derechos iguales pa' boricuas homosexuales" (samrajtojn por borikenanoj samseksemaj). Unu el ili portis mal–longegajn ruĝajn pantalonojn kaj blankan ĉemizon kaj la organizintoj de la parado malpermesis ke li partoprenu, rakontis Domínguez. "Ni emfaze petis ke tiu junulo marŝu kun ni kaj finfine ni sukcesis", komentis la borikenano. "Poste de la defilado mi sentis min forta kaj plen–energia. Tio signifis ebli aperte esti geja antaŭ mia komunumo." La Komitato defilis sinsekve dum kvar jaroj, ĝuante bonajn momentojn kaj bedaŭrante aliajn ne tiel bonajn, kiel tiun kiam el la ĉeestantaro iu alĵetis kontraŭ ni lad-skatolon.

Iom post iom, la organizo displitiĝis, siaj komitatanoj partoprenontaj en naciaj defiloj por semseksemaj rajtoj; ekzemple, en Vaŝingtono. Jorge Merced, artestro de kompanio Teatro Pregones, bonege memoras tiujn marŝojn en la ĉefurbo sed,




*Ricky Martin, Reĝo de la Parado 2007*

---

*antaŭ alveno de hispanoj, uzata hispane, krom vorto "puertorriqueño", kaj kelkfoje por nomi portorikdevenajn ulojn eksterinsule. En la hispana: "boricua", "borincano", "borinqueño".*

antaŭ ĉio, eblon partopreni en la portorika defilo de Novjorko je la fino de la 80-jardeko.

Tiame, la Komitato jam ne ekzistis; la kontingenton de gegejoj en la defilo formis la Boricua Gay and Lesbian Forum (Geja kaj Lesba Forumo Borikena), naskiĝita je 1987. "Ni celis eduki la latinan[2] komunumon kaj ankaŭ krei agendon pri socia konscienceco. Ni volis instigi homojn pensi kaj fari impreson", komentis Merced, kiu nun estas 43-jara. Komence, la defilo neis al Forumo la defilpermison, sed poste de ia premo, ili konsentis, diris Merced. "Ni troviĝis inter la lastaj marŝantoj. Kelkaj insultis nin sed plejparte homoj aplaŭdis nin. Ĝi estis neforgesebla sperto", memoras la borikenano.

La Forumo partoprenis en la defilo sinsekve dum kvar jaroj antaŭ esti sekvata de aliaj grupoj kiel Latin Gay Man of New York (Latina Gejviro de Novjorko). Aliaj epokfaraj organizoj kiuj partoprenis ekde la 80a jardeko estis Las Buenas Amigas (La Bonaj Amikinoj) kun homoj kiel Brunilda Vega y Daisy de Jesús, kaj poste Caucus Latino (Kunsido Latina) de Act-up. "Mi pensas ke komence partopreni estis malfacile sed kiam pordo malfermiĝis ne estis plu da obstakloj", diris Merced.

Cezaro Carrasco, 53-jara sociallabor–isto, memoras la defilojn je la 90-a jardeko, kiam la ajdosepidemio iĝis la plejgrava lukto. "Ni ĉeestis por fari aktivismon kaj la akcepto estis tre favora. Ni surpriziĝis", diris Carrasco, kiu partoprenis en la Defilo kiel Caucus-ano kaj memoras la milojn da panfletoj disdonataj kun oficiala informado por tiuj tuŝitaj de HIV/ajdoso.

Nun la cetero estas historio kaj multaj estas la partoprenintaj grupoj kiel la Colombian and Lesbian Gay Association (Kolombia kaj Lesba Gejasocio) aŭ Primer Movimiento Peruano (Unua Perua Movado).

Trinity Rivera, ano de la administrativa konsilio de la Defilo, diras ke ĉi jaron neniu grupo de gejoj, lesboj aŭ transseksemuloj partoprenas ĉar neniu petis. Tamen multaj memoras ĝin kiel defilon por ĉiuj. Estas defilo je kiu oni konscias pri tio, ke la latina komunumo estas diversnuanca", diris Andrés Duque, kolombiano kiu defilis je 2002. "Ĝi estis unu el la plej nekredeblaj spertoj de mia vivo."

FUNDAMENTISTOJ INSTIGAS REGISTARON DE PORTORIKO AL KONGRAŬGEJA AGADO

Jorge de Castro Font, senatano por la Partio Nova Progresista, kun la forta favoro de religiaj organizoj, inter kiuj pentekost–anoj kaj aliaj fundamentistaj grupoj, postulis ke lia partio enskribu en ĝia platformo subtenon al



*S-ro Jorge de Castro, senatano*

2 *Latina: Usona loĝanto aŭ civitano latin-amerikdevena.*

Rezolucio 99-a.

Ĝi enskribontus en konstitucio de la insulo agnoskadon de nur aliseksemaj geedzecoj. Jam antaŭe instigis al leĝo-projekto la samaj fundamentistaj sektoroj ankaŭ apogate de la Katolika Eklezio kies episkopo skribis apertan rezolucisubtenan leteron pere de ilia insula ĵurnalo al registaro je februaro 2008. Tamen, la rezolucio 99-a ne venkis dank' al protestoj de multaj sektoroj de la socio. Verŝajne la senatano pensis ke revivigi la rezolucion favorus sian partion.

Tiel ne okazis. La tri pli gravaj partioj rifuzis rekonsideri la aferon malgraŭ la reapogo de samaj fundamentistoj. Revivigo de la rezolucio tuje reinstigis ankaŭ la protestojn de kleraj sektoroj. La rezolucio ne nur ŝokis multajn nefundamentistajn civitanojn pro ĝia samseksemfobio sed ankaŭ pro ĝia animdrakona inspirado ĉar verŝajne ĝi forrabus rajtojn de ne-edzaj paroj ĉu samseksaj ĉu aliseksaj kaj ankaŭ de iliaj infanoj aŭ infanoj naskitaj foredze.

Dum la tria semajno de aŭgusto, la kandidato al insulestro por la Partio Nova Progresista, José Fortuño, respondante al scivolo de ĵurnalisto pri lia opinio rilate al revivigo de la rezolucio 99-a, deklaris jene antaŭ publiko kaj kameraoj de teleĵurnalo TuTV:

«Rajtoj [en Portoriko] estas por ĉiuj. Tio estas, ĉiu civitano meritas plenan ĝuon kaj uzon de tio kion nia konstitucio postulas, sendepende de ĉu temas pri kuniĝo inter viro kaj virino needziĝataj, tiujn kiuj havas infanojn eksteredze, tiujn kiuj neniam geedziĝis…, aliseksan aŭ eĉ samseksan paron; ĉiu devas havi voĉon kaj rajtojn.»

Aliflanke, Víctor García San Inocencio, proparolanto por la Partio Sendependista Portorikana (hispane PIP, Partido Independentista Puertorriqueño) deklaris por publko kaj TuTV ke:

«[rekonsidero de tiu rezolucio] elmontrus absolutegan malforton politikan de iuj ajn estro permesonte ĝin. Tra–proceduri tiun rimedon, krom esti reakcia, atencas kontraŭ la fundamentaj rajtoj de centmiloj da homoj en Portoriko: la rajto por ke paroj povu loĝi kune, ĉu edzaj ĉu ne, ĉu aliseksemaj ĉu samseksemaj; la rajto ke gefiloj ne estu diskriminaciataj pro tio ke iliaj gepatroj neniam geedziĝis. Prias absolutan reakciaĵon.»

La nuna insulestro, Aníbal Acevedo Vilá (Partio Populara Demokrata), deklaris ĉi-rilate: «… Luis Fortuño havintas 99ajn malsimilajn poziciojn. La pozicio de nia partio estis klara ekde la komenco kaj estas enksribita en la estra platformo de l' Partio Populara sen ia-ajn polemiko.» Pludiris Acevedo Vilá, ke «la propono pri konstitucia amendo nur taŭgus por dividi la landon kaj fari diskriminadon.» En la paĝo 155 de la platformo, sub la titolo 'Malakcepto al diskriminado', la Partio Populara Demokrata klare determinis ĝian pozicion jene:

«Ni reasertas, plue, ke geedzeco estas inter viro kaj virino. Tamen, ni malakceptas plenenergie provon starigi ĉi-aferon al rango konstitucia

konsiderante ke nia Konstitucio historie agis por doni kaj plivastigi rajtojn, ne por limigi ilin. La propono por konstitucia amendo pri tiu-ĉi temo taŭgas nur por dividi la landon kaj provoki diskriminadon», diras la dokumento.

Finfine, je la 14-a de aŭgusto, ĝia proponanto, de Castro Font, rezignis sian intencon ĉar ĝi «malutilus» politike al insulestra kandidato de sia partio, Luis Día demandis al de Castro Font ĉu li repentus. «Nur ricevonte mandaton kaj garantion kaj konsenton de komitato de la plimulto de la Senato kaj ĉambro de la deputitoj», diris de Castro Font.

La 22-an de aŭgusto, ĵurnalistoj denove demandis al Fortuño pri la rezolucio. Li emfazis antaŭ la kameraoj de TuTv ke sia partio estas "pluralista kaj tolerema".

# Mortis Jörg Heider

La ĵus pasintan 11-an de oktobro mortis en aŭtomobila akcidento Jörg Heider, registestro de Karintio (Aŭstria landero) kaj gvidanto de la ekstremisma dekstrula partio BZOE.

Li veturis tro rapide, mem kondukante la aŭtomobilon ebria, post la 1-a nokte. Laŭ la noticoj, oni vidis lin, pli frue, en la geja trinkejo Zum Stadtkrämer, kune kun junulo, kaj drinkis tre multe.

Ne estas novaĵo, ke la politikisto – edziĝinta kaj jam kun du filinoj – frekventis gejejojn kaj estis plurfoje tie fotita kune kun junaj viroj, tamen la polikististaro ĉiam prisilentis la aferon kaj provis preteratenti la “skandalon”. La politikaj ideoj de lia partio, de Heider mem ripetataj, estas klare homofobiaj.



# Historio de LSG

Dum la venonta UK en Bialistoko Pollando, LSG festos 30 jarojn de renkontiĝoj kadre de UKoj. Okaze de tiu festo, ni intencas eldoni libreton pri la pioniraj tagoj de LSG, kiu ankaŭ inkluzivas rakontojn, anektodojn, historiojn kaj de la pasintaj anoj de LSG kaj de la nuntempaj membroj kaj siaj vivoj.

Tamen, ne ekzistas multaj arĥivaĵoj kaj multaj fruaj Liganoj jam forpasis, kaj pro tio estas malfacile kompili definitivan historion. Mi kaj alia estrarano jam komencis esplori kelkajn esperantajn

arĥivejojn kaj intervjui kelkajn Liganojn el la fruaj tagoj, sed ni ankoraŭ bezonas vian helpon, eĉ se vi estas nova membro!

Se vi estas membro de LSG de la fruaj tagoj kaj havas interesajn anekdotojn, rakontojn, arĥivaĵojn pri personoj, renkontiĝoj ktp, bonvolu kontakti min ĉe la retadreso ĉi-sube. Same, se vi havas iujn ajn arĥivaĵojn, kiuj eventuale interesos nin, bonvolu ankaŭ kontakti min.

Kiel mi diris, ni ankaŭ serĉas interesajn rakontojn ktp de nuntempaj LSGanoj, eble pri via vivo/travivaĵoj, denove kontaktu min. Se vi estas afrikano, aziano, lesbo, trans-seks/genr-ul(in)o aŭ/kaj loĝas en lando kie esti gej(in)o/trans-seks/genr-ul(in)o ktp ne estas facile, denove, ni aparte invitas vin kontakti nin.

Mi volas emfazi, ke ni nepre respektos vian anonimecon, se tion vi volas, kaj ne mencios vian nomon en la libro nome, tamen, mi ja bezonas vian veran nomon por la korespondado. Se vi preferas uzi pseŭdonomon (plumnomon), do donu tion al mi!

Se vi havas ajnajn demandojn, ne hezitu kontakti min.

Amikajn Salutojn,

Harry Barron (estrarano)
Healingcymru (at)gmail.com

# Geja Parado en Madrido (Hispanio)

DU MILIONOJ DA HOMOJ FESTIS EN MADRIDO LA GEJAN PARADON.

La unuan semajnfinon de la pasinta Julio, en Madrido, ni festis la Gejan Paradon. Sed ne nur estis manifestacio. La festo komenciĝis unu tagon antaŭ la oficiala dato (merkredo), per diversaj kulturaj eventoj. Estis diversaj fot-ekspozicioj, teatroj, prezentoj de libroj, kaj eĉ balkon-konkurso por elekti, kiu balkono estis plej bele dekoraciita. Ankaŭ estis konkurso pri diversaj sportoj.

Ĉi-jare oni decidis sanĝi la normalan tagon por la parado. Ĝi okazas kutime la sabaton plej proksiman al la dudekoka de junio. Sed ĉi-jare oni prokrastis je unu semajno por ke en alia urbo de Hispanio oni povas festi kaj manifestacii. Poste, kune, ni festis en Madrido.

Dum tri tagoj la homoj vizitadis la gejan kvartalon, Chueca, plenan per ĉielarkaj flagoj. La varma vetero helpis por ke viroj kaj virinoj elmontris la rezultojn de siaj klopodoj dum la jaro en la gimnastejo. La diversaj trinkejoj movas siajn drink-benkojn eksteren kaj oni povas promeni tra la stratoj kaj vidi diversajn homojn ŝatantajn vivi la feston, gejajn parojn, lesbajn parojn, viron kaj





virinon, familiojn kun siaj infanoj, maljunulojn. Vi povas senti ke ĉiuj kunvivas sen problemo dum la festo.

Dum ĉi tri tagoj estis diversaj spektakloj, festparoladoj ĉe la komenco de festoj kaj koncertoj. Ni havis konkurson por elekti la "Mister Gay" de la festo, kaj la jam tradicia "Carrera de Tacones" (Kalkanuma kurado) en kiu la viroj estas vestitaj per malbelaj kaj malmultekostaj virinaj vestaĵoj, portas ankaŭ mansakojn, perukojn kaj altkalkanumajn ŝuojn. Ili kuras laŭ strato por du cent metroj, gajnas tiu kiu unua alvenas al la celo kaj perdas neniun vestaĵon dum la kurado.

Kaj la plej grava afero estas la sabata manifestacio[3]. Bona kaj varma vetero helpas la festecan senton. Oni ne devas forgesi botelon da akvo, por drinki, kaj por refreŝigi varman korpon kiu abundas. Ĉi tiun jaron estis du milionoj da homoj.

Ĝi iras tra la stratoj de la urbo centro. Unue aperas la diversaj asocioj, politikaj grupoj kaj la grupoj de aliaj aŭtonomaj komunumoj de Hispanio. Poste sekvas la festanta grupo, diversaj entreprenoj kun granda kamionoj kiuj portas belajn knabojn, virojn kaj virinojn, kaj grandaj laŭtparoliloj kiuj kraĉas dancan muzikon por vigligi la spektantojn kaj instigi danci tiujn, kiuj staras dum kelkaj horoj.

Kaj finfine, se via korpo ankaŭ volas pli, en diversaj lokoj estas festoj por danci dum la tuta nokto. Festoj estas por diversaj gustoj: gejoj, lesboj, ursaj viroj,

3 *Ankaŭ nomita "Christopher Street Day" (CSD), vidu Forumon n.4/2007 [n.d.l.r.]*

ledemuloj, ktp.

Kiam ĉio finiĝas, nur pensas en la venonta jaro por festi denove. Do, se vi volas, vi estas invitita.

Juanjo

# Geja memoraĵo difektita en Berlino

La germana gegejula asocio alvokis por manifestacio la 2008-08-18 17:00 antaŭ la memoraĵo geja en Berlin, ĉar iu je la 2008-08-16 detruis parton de la memoraĵo. Ĝi estas kubo el betono kun longeco ĉ. 2,5 m. En ĝi estas kvarangula kubforma truo kun longeco ĉ. 0,4 m.; ĝi estas ĉ. 1,3 m super la grundo. Antaŭ la truo estas fenestrovitro, kaj malantaŭ la fenestro estas monitoro, sur kiu estas videbla filmeto pri du junaj viroj unu la alian kisantaj.

La krimulo detruis la fenestron. Pro tio ĉirkaŭ 300 homoj manifestaciis. Parolis la urbestro de Berlin, Klaus Wowereit, kaj membroj de partioj kaj de gegejula asocio. La manifestacio daŭris nur 25 minutojn, estis la plej mallonga de mia vivo.

La memoraĵo estas situata en la plej granda parko de Berlin, la "Tiergarten" ("bestĝardeno"), 200 m okcidente de memoraĵo por murditaj gejudoj dum faŝismo [52° 30' 49'' n., 13° 22' 36'' or.]

La 2008-09-05 mi fotografis ĝin; ĝi estis sendifekta.

Ulrich Wilke

